



Finfine atingis la esperantan publikon **Gerda malaperis-La filmo**. Bazita sur la internacie konata lernolibro de **Claud Piron Gerda Malaperis**.

Ĝi daŭras **unu horon kaj dekdu minutoj**.

Ludas **18 geaktoroj**, kaj kunlaboris 11 personoj plus **9-homa teknika** teamo. La filmado postulis **6 monatojn** de intensa laboro, kaj oni prezentis ĝin en la UK de Florenco, kie la **DVD-versio** furoris.

Nu, ni staras, antaŭ tre, tre bona **ilo por ellerno de la lingvo**, danke al bona prononcado, al subtitoloj en Esperanto, la hispana kaj aliaj lingvoj, kaj al interesa intrigo. Akiru ĝin pere de **Pedro A. Hernández Úbeda**.

**Gerda Malaperis** estas originale **esperantlingva romano** verkita en **1983** de **Claude Piron** el Svisio. Eldonis ĝin **Fonto**, Brazilo.

La libro estas la plej fama instrua rakonto en Esperanto. Ĝi estas plena de simplaj dialogoj el ĉiutage uzataj vortoj kaj taŭgas por plibonigi la konon de Esperanto ĉe gelernantoj. La rakonto temas pri junulaj amoj kaj mistera forkapto de tradukistino.

## Nova vortaro

Celeante solvi la mankon je moderna vortaro Hispana/Esperanta/Hispana post la bankroto kaj malapero de la eldonejo “**Sopena**” distribuinto de la eldonaĵoj de “**Lexicon Sopena**” kaj ĝistiam disvendinto de vortaroj pri Esperanto i.a., en la jaro 2002 Miguel Gutiérrez Adúriz publikigis provizoran vortaron nomata **Diccionario 2002**.

Nun, la nova vortaro “**Amika**”, el la sama M. G. Adúriz, estas la definitiva versio. Ĝi estas tre bona helpilo por ĉiu hispanlingva esperantisto. Por ĝia ellaborado estis uzitaj la dika **Gran Diccionario Español-Esperanto** de Fernando de Diego kaj la **Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto** de SAT. La parto Esperanto/Hispana enhavas pli da terminoj ol tiuj kiuj enhavus iu modesta poŝ-vortaro cele solvi, provizore, la mankon je granda vortaro Esperanta/Hispana komparebla al tiu de F. de Diego.

DICCIONARIO  
**Amika**  
VORTARO

Español - Esperanto  
Esperanto - Hispana

mga

150-a naskiĝdatreveno de la kreinto de Esperanto, d-ro L.L.Zamenhof

**“ESPERANTO Y ZAMENHOF: DESAFÍO A BABEL”**  
Forumo organizita de Esperanto-Liceo de Madrid  
25a kaj 26a de aprilo.

Centro Dotacional Integrado de Arganzuela  
c/ Canarias 17. (Metro Palos de Moguer)

### Sabato 25

- 10,30 Inaŭguro de esperanta libroservo
- 11,00 “Zamenhof, gestación del idioma universal” .Juan del Castillo
- 12,30 “Pioneros del esperanto en España”. Toño del Barrio
- 17,00 “Esperanta poezio”. Jorge Camacho
- 19,00 Koncerto de Koruso “Verda Stelo” en ĝia 25a datreveno.

### Dimanĉo 26

- 10,30 “Braille y Zamenhof”. Pedro Zurita
- 12,30 Koncerto de Koruso “Grupo Esperanto”